



1

# homo kaj kosmo

esperanto-revuo

Nia Tero, kiel planedo, estas nur ja eteta polvo en la senfina Kosmo. Ali kiu, do, se ne al la astronomoj, estu pli sensenca la absurdo, ke sur nia planedeto ekzistas centoj de antagonismaj ŝtatoj kaj 3000 lingvoj!

(El la libro de la junaj astronomoj-esperantistoj  
»Tragedio en la Universo«)

## LA FOTO SUR LA KOVRILPAGO:

Panoramo al **Esperanto-somerumejo Primošteno** (fotite de nordo — maldekstre estas »Esperanto-golfo«)

## HOMO kaj KOSMO

populara naturscienca Esperanto-revuo

Eldonisto:

ASTRONOMIA OBSERVATORIO de la Kroata  
naturscienca societo, Zagreb, Jugoslavio  
La revuo »HOMO kaj KOSMO« aperas kvaronjare

### LA ENHANO DE ĈI NUMERO

#### Artikoloj

Gustav Kren:	Ĉiela laboratorio (»Skylab«)
Ing. Zlatko Britvič:	»Syncom III« — olimpika satelito
Rade Petkovič:	»Sepa kontinento«
Dr Gabriel Divjanovič:	Se ĉiuj patrinoj de la mondo ...

Rubrikoj: Vidindaĵoj en la ĉielo • Interesaĵoj kaj kuriozaĵoj • Novaĵoj • El la Esperanto-mondo • Premia konkurso  
• El la redakcio

La revuon »HOMO kaj KOSMO« redaktas la redaktora komitato. Ĉefa redaktoro: dro Gabriel Divjanovič, direktoro de Astronomia observatorio. Respondeca redaktoro: Maria Divjanovič, sekretario de la Observatorio. Teknika redaktoro: Stjepan Gavoruŝiĉ, grafikisto. Korespondistino: Maria Divjanovič.

Jarabono: 1,70 us. dol. (aŭ 7,80 franc. fr, aŭ 4,90 germ. marko) ktp — vidu pri tio pli detale sur la paĝo 32). Jarabono por Jugoslavio 15 novaj dinaroj

La revuo »HOMO kaj KOSMO« estas abonebla en ĉiuj landoj.

**Esperantistoj — natursciencistoj kaj naturamantoj — estas petataj kunlabori en nia revuo.** La artikoloj ne estu fak-sciencaj, sed popularaj kaj nepre — interesaj! La manuskriptojn la redakcio ne resendas. Artikolojn kaj verkaĵojn sendu al la adresoj: Astronomia observatorio, poŝtfako 38, 41103 Zagreb, Jugoslavio.



POPULARA NATURSCIENCA ESPERANTO-REVUO

Jaro XI

Unua jarkvarono 1973.

N-ro 1.

## ĈIELA LABORATORIO («SKYLAB») ANTAŬ REALIGO

(Gustav Kren, kunlaboranto de la Observatorio)

Nia revuo jam plurfoje informis, ke la sekva paŝo en konkerado de la Kosmo estas instaligo de orbita (ĉirkaŭtere fluganta) esplorstacio. Lanĉi tiajn staciojn en la orbiton de la Tero planas samtempe sovetoj kaj usonanoj. La unuaj paŝoj al realigo de tiaj »orbitaj stacioj« estas la sovetaj stacioj de tipo »Saljut«. Nun la usonanoj anoncas lanĉi ankaŭ sian stacion, kiu estas konata sub nomo »Skylab« (»Ĉiela laboratorio«).

Ĝuste dum ni skribas ĉi tiujn vicojn, en Usono estas preskaŭ tute finpretaj ĉiuj preparoj por lanĉi la unuan »Cielan laboratorion« en ĉirkaŭteran orbiton. (La stacio devis esti lanĉita jam la 30-an de aprilo, sed oni prokrastis la lanĉon pro iuj teknikaj pliperfektigoj. Eble la stacio jam ĉirkaŭvojaĝos la Teron pli frue ol nia revuo estos finpresita en la presejo!).

Kio estas »Ĉiela laboratorio« (»Skylab«) kaj kia estas ĝia celo?

Ĉiela laboratorio estas pli granda ol ĉiuj ĝisnunaj artaj satelitoj: ĝi estos peza pli ol 80 tunojn (do, proksimume, kiel malgranda lokomotivo). Jam tiu ĉi pezo montras, ke la stacio estos granda kiel ia konstruaĵo. Kaj vere, en la »orbita stacio« estos sufiĉe da loko, por ke en ĝi povu (relative) komforte vivi tri astronautoj dum plenaj 56 tagoj en unu turnuso (ekipŝanĝo). Nome, en unua turnuso tri astronautoj restos en la Kosmo 28

tagojn kaj — se ĉio funkcios bone — la unuaj tri »astronaŭtoj-dejorantoj« en la Kosmo reiros Teren kaj ilin anstataŭos la dua ekipo de tri astronaŭtoj. Tiu ĉi dua ekipo restos en la stacio 56 tagojn, do, preskaŭ du monatojn. Post tiu dua ekipo venos ankaŭ la tria, kiu restos en »Ĉiela laboratorio« ankaŭ 56 tagojn.

La procedo de la instaligo en la Kosmo estos sekva: unue estos lanĉita la stacio mem (sen homoj) per fortega raketo-portanto »Saturno 5«. Sed la raketo »Saturn 5« profitos nur siajn du unuajn movigajn »ŝtupojn«. La tria ŝtupo (kiu ĝis nun portis homojn al la Luno) estos rekonstruita kaj adaptita por restad-bezonoj de la astronaŭtoj.

La sekvan tagon post lanĉado ekflugos nova raketo, kiu portos tri homojn en kosma ŝipo de tipo »Apollo«. La ŝipo »Apollo« kun tri astronaŭtoj unue faros tri flugojn ĉirkaŭ la Tero kaj nur post la faritaj tri rondiroj »Apollo« aŭtomate kuniĝos en la kosmospaco kun la orbita stacio.

Post firma (hermetika) kuniĝo la astronaŭtoj transiros el kosma ŝipo »Apollo« en la »orbitan stacion« kaj restos en ĝi por realigi sian programon.

Kian programon havas la ekipoj restontaj en la Kosmo tiom longan tempon?

La astronaŭtoj faros diversspecajn sciencajn kaj teknikajn esplorojn — aparte tiujn, por kies plenumado estas bezona longa restado en kosmaj kondiĉoj. Cetere, la astronaŭtoj en la ekipo de la orbita stacio »Skylab« estos provizitaj per nekompareble pli riĉa instrumentaro, ol iu ajn ekspedicio vizitanta ĝis nun la Kosmon.


Certe multaj el niaj legantoj, zorgantaj pri paco en mondo, faros la demandon: »Ĉu la stacio estos profitita por fari ankaŭ iujn taskojn kunlige kun militistaj bezonoj?«

La militistaj fakuloj respondas al tiu ĉi demando per glata »Jes!«.

Tamen en ĉi tiu ne tro entuziasmiga perspektivo ni aldonu ĝojigan novaĵon rilate al ĝisnunaj kosmaj ekspedicioj:

Sovetoj kaj usonanoj deklaris lastatempe jam plurfoje, ke ili lanĉos baldaŭ — ĉiu po unu ekipon de astronaŭtoj — kiuj ekipoj kuniĝos en unu komuna stacio kaj kune restados kaj laboros en ĝi.

Tia »miksa« ekipo certe okupiĝos nur per sciencaj kaj ne militistaj taskoj...



»Ĉiela laboratorio« (»Skylab«, en kiu astronautoj vojaĝas ĉirkaŭ la Tero esplorante la Kosmon

Ni esperu, ke tiu ĉi promeso de ambaŭ superpotencoj estos baldaŭ vere realigita je granda kontento de la homaro jam sufiĉe enzorgiginta pro la minaco de nuklea milito profitanta eĉ kosmajn spacojn.

## OLIMPIKA SATELITO

(Respondo al la demando de leganto P. K. el Bruselo)

Okaze de la olimpikoj en Tokio en 1964. estas ĵetita en orbiton ĉirkaŭ la Tero unu el la plej interesaj satelitoj (el vidpunkto scienca, kaj precipe matematika). Ĝi estis »Syncom III«, kiu »starante« konstante kiel televida relajsostacio super unu punkto de Pacifiko, ebligis televidian dissendon de olimpikoj en la granda parto de terglobo.

»Syncom III« apartenis al la serio »Comsat« (»komunikaj satelitoj«). Tio estis la komenca fazo de t. n. »geostaciaj satelitoj«. Serio »Comsat« estas anstataŭigita poste per pli moderna serio

»Intelsat« (»Internaciaj telekomunikiĝaj satelitoj«), en kiun se-  
cion apartenas ankaŭ la fama »Early Bird« (»Frua birdo«) aŭ  
oficiale »Intelsat I«.

Al ĉiuj »geostaciaj« satelitoj la celo estas ebligi fine unuecan  
televizian dissendon por nia tuta planedo kaj ankaŭ ebligi reci-  
prokajn telefonajn kaj radioligojn de ĉiuj lokoj sur la terglobo.

Nia leganto ankaŭ demandas kiamaniere oni povas »mate-  
matike« klarigi la moviĝon de geostacia satelito ĉar ĝi »staras«  
ĉiam sur la sama loko kaj tamen rotacias ĉirkaŭ la Tero por ne  
sur ĝin fali...

La afero el vidpunkto »ĉiel-mekanika« kaj matematika estas  
mirinde simpla: tiuj satelitoj estas sinkronigitaj kun rotacio de  
la Tero. Kion signifas »sinkronigita«? (de kio certe ankaŭ la  
vorto »Sin-com«). Sinkronigita kun rotacio de Tero signifas, ke  
la satelito unufoje revolvas (ĉirkaŭflugas) ĉirkaŭ la Tero precize  
dum la sama tempo dum kiu ankaŭ la Tero turniĝas ĉirkaŭ sia  
akso t. e. dum unu tago.

Iu demandas: ĉu estas eble alĝustigi, ke satelito revoluu pre-  
cize dum unu tago se ni scias, ke Luno, kiel natura satelito,  
bezonas por tio preskaŭ tridek tagojn?

Jes, sed ni memoru, ke artsatelitoj povas revolui ĉirkaŭ la  
Tero eĉ dum nur unu horo kaj duono (90 minutoj!), kaj tio signi-  
fas, ke »ie« inter la distanco de artsatelito kaj la Luno devas  
ekzisti (teorie imagata!) orbo, pli longa ol orbito de artsatelito,  
kaj pli mallonga ol orbito de la Luno laŭ kiu la programita  
satelito rondirus la Teron precize »laŭ mendo« — dum unu  
tago...

Do, sciante la tempon, ni devas (matematike) trovi la res-  
pektivan distancon de satelito de la Tero. Tie helpas nin la genia  
tria leĝo de Kepler: »Kvadratoj de rondiraj tempoj de planedoj  
ĉirkaŭ la Suno rilatas kiel kubo de iliaj mezaj distancoj de  
Suno.« Kaj tio validas por la Suno kaj la planedoj, por la Tero  
kaj ĝiaj satelitoj. Jen tiu leĝo esprimita per formulo:  $T^2 : t^2 =$   
 $D^3 : d^3$ , kie  $T$  (aŭ  $t$ ) estas rondira tempo, kaj  $D$  (aŭ  $d$ ) distanco.  
Se nun en tiun formulon ni envicigas tion kion ni scias (kaj kiel  
helpon ni prenas kiel »partneron« nian naturan sateliton la Lu-  
non) ni ricevas  $27^2 : 1^2 = 60^3 : d^3$  (kie 27 estas rondira sidera  
tempo de Luno ĉirkaŭ la Tero, 1 estas ĝuste tio kion ni volas —  
ke geostacia satelito ĉirkaŭfluigu la Teron dum unu tago; 60 estas  
distanco inter Luno kaj Tero esprimita en Teraj duondiametroj).

Restis, do, »nekonata« nur »d«, kaj ĝi estas distanco (»al-teco«) de geostacia satelito de centro de la Tero esprimita en Teraj duondiametroj.

Ĉiu iom pli aĝa lernanto de elementa lernejo facile transformos la supran proporcion en ekvacion kaj ricevos la rezulton: geostacia aŭ sinkrona satelito devas troviĝi je distanco de 6,6 Teraj duondiametroj (aŭ rondcifere 35.000 km malproksime de surfaco de la Tero) por povi kontentigi kaj homajn bezonojn (kiel »senmova« relajsostacio) kaj la leĝojn de ĉiela mekaniko (ke ĝi rondiru ĉirkaŭ la Tero ĝuste per tia rapido, per kia devas rondiri la satelito je difinita alto).

La homo per sia intelekto ne nur ekkonas la leĝojn de la Universo, sed ankaŭ en praktiko utiligas siajn ekkonojn. Se Kepler estus vivanta, li ne povus ricevi pli grandan rekonon por sia (kiel iuj homoj malprave diras) »nura filozofado« ol estas geostaciaj satelitoj.

## »SEPA KONTINENTO«

— ĉu fantazio aŭ realaĵo?

(Rade Petkoviĉ, delegito de UEA, Ŝibenik, Jugoslavio)

La ideon donis la filmo »Sepa kontinento« (»Sedmi kontinent«), kiun reĝisoris kaj filmigis Dušan Vukotić, laŭ la film-novelo de Rujena Fišerova (ĈSSR). En tiu filmo estas donita vizio de nova mondo en kiu infanoj, reprezentantoj de blanka, flava kaj negra raso, trovas neloĝatan insulon kaj en naturo, ne ŝarĝita de hodiaŭa civilizo, organizas vivon en reciprokaj amikeco kaj amo. La infanoj forkuris el la mondo de plenaĝuloj serĉante pli belan kaj pli noblan mondon. Ne trovinte tian mondon en teknike ĝis maksimumo progresinta sed senhumanigita socio, ili foriras al »sia kontinento« por tie krei mondon, en kiu ili vivos pli feliĉe.

Tian infanvizion decidis realigi al esperantistoj vizitintaj Primoštenon jam bone konata urbo Ŝibenik, kiu per firmiĝinta »Festivalo de infano« jam evoluas al la rekonita »infana metropolo«. Ni utiligu la okazon por informi, ke ankaŭ ĉi jare okazos en tiu urbo (jam la 13-a) Jugoslavia infanfestivalo inter 23. VI kaj 3. VII, kaj, ke en la manifestacia parto de la festivalo partoprenos la plej elstaraj infanaj kaj junularaj teatroj el la lando kaj la mondo.

La ideo provi realigi la vizion de »Sepa kontinento« sur unu insulo de la Ŝibenika insularo estis prezentita en julio 1968, post prezentado de la menciita filmo dum la Naŭa infanfestivalo. Post multflankaj antaŭpreparoj la Konsilantaro de komunumo Ŝibenik en kunsido de 7. II 1970 decidis, ke nelogata insulo Kakan, troviĝanta dek mejlojn de urbo Ŝibenik, longa 5 000 m, larĝa 100—1 000 m, parte arbarumita, estu donacita por realigo de la ideo pri Sepa kontinento. Post tiu decido estis elektita agadkomitato por la realigo de tiu ideo. Multaj unuopuloj, institucioj kaj organizaĵoj estis informitaj pri tiu ideo kaj pri ebloj por ĝia realigo. Tiamaniere la ideo eniris en la vastan publikon kaj estis akceptita kun aprobo.

La Plenumkonsilantaro de Kroatia Parlamento subtenis la aferon per sia decido dum la kunsido de 6. IV 1970 »kiel escepte pozitivan kontribuon al la ĝeneralaj klopodoj de nia socio en kreaĵ strebadoj por realigo de tendenco al la mondpaco kaj pacema kunekzistado de ĉiuj landoj kaj popoloj.«

Ĉar la ideo disvastiĝis kaj ricevis daŭre pli grandan nombron da adeptoj kaj simpatiantoj, en Ŝibenik konstituiĝis 13. VI 1970 Jugoslavia komitato por realigo de la ideo de »Sepa kontinento«, en kiun eniris ankaŭ la Nobel-premiito Ivo Andrić kaj pli ol dudeko de elstaraj personoj el jugoslavia kultura kaj politika vivoj.

Laŭ la decido de la Komitato estis sendita letero al la Ĝenerala sekretario de OUN, al kiu respondis la direktoro de Kabineto de la Ĝen. sekr. S-ro Robert G. Miller, esprimante apartan kontenton kaj feliĉon pro tia ideo. Post tio la ideo komenciĝis disvastiĝi kiel movado inter la infanoj kaj plenaĝuloj tra la tuta mondo. Estas fondita granda nombro da kluboj de Sepa kontinento en elementaj lernejoj, kiu organizas aron da manifestadoj. Alvenis multnombraj leteroj el multaj landoj. La urbon kaj la insulon vizitis aro de elstaraj personecoj inter kiuj ni menciuj nur S-ron Bam Arvind, konstantan reprezentanton de OUN, S-ron Birger Halden, la direktoron de Informcentro de OUN por Albanio kaj Jugoslavio, S-rinon **Josephine Baker**, kiu post sia vizito de la insulo en oktobro 1971 estis entuziasmigita kaj volonte akceptis esti ambasadoro de tiu ĉi ideo.

Ankaŭ la aliaj helpis la ideon alimaniere. Ekz. firmao »Standard« el Oslo, okaze de metado de submara kablo por elektrumigo de najbaraj insulo Kaprije kaj Ĵirje, kiam estis konsiderata





La alta protektanto de Universala Kongreso de Esperanto en Beogrado, **Josip Broz-Tito**, la prezidento de SFR Jugoslavio en sia laborĉambro. Kamarado Tito esprimis la simpatian por Esperanto kaj, cetere, lernis Esperanton en sia junaĝo

La prezidento Tito antaŭ nelonga tempo akceptis s-inon **Josephine Baker** kunlige kun infana »Sepa kontinento«, kies ambasadoro estas s-ino Josephine Baker

la kablo ankaŭ por insulo Kakan, donacis parton de la kablo ĝis Kakan (1 400 m) kaj senpage metis ĝin. Alvenis ankaŭ deklaro de Katsumi Nage of CND Group, Engineering College of Hosei University el Tokio por senpaga ellaboro de arkitektprojekto por la tuta teritorio de »Sepa kontinento«.

La faka ellaboro de elaborato pri ideaĵ, programaj kaj priterenaj konceptoj de Sepa kontinento estas komisiita al Centro

por eksterlerneja eduko, kies sidejo estas en Zagrebo. Nun oni laboras sur du reloj: unue, je antaŭpreparoj por fizika realigo de »Sepa kontinento«, due, je disvastigo de la ideo kiel movado. La pasintaj jaroj prezentis la unuan fazon en la realigado de la ideo, t. e. fazon de firmiĝo de la ideo kaj kreadon de favora klimato. Dank'al Jugoslavia Radio kaj Televido kaj la tuta preso, precipe de porinfana (en kiu aperis miloj da artikoloj) ĝis nun estas atingitaj tre bonaj rezultoj.

Nun sekvas la dua fazo de farendo: trankvila, studema kaj tute respondeca laboro. Oni devas ĉiam havi antaŭ la okuloj tion, kion ni esperantistoj havis kreante siatempe nian E-kampadejon en proksima Primošteno. Ankaŭ la ideo de Sepa kontinento estas longedaŭra projekto, kiu ne dependas de monato aŭ jaro. Kaj je la fino mi starigas demandon: ĉu la afero fariĝu ankaŭ nia afero?

Nepre jes, kaj jen kial: la celoj de Infanfestivalo kaj Sepa kontinento estas parencaj al la ideoj por kiuj batalas ni, esperantistoj. Sekve ankaŭ ni devus kontribui al la noblaj ideoj ankaŭ per enkonduko de Esperanto en la festivalon kaj la internacian »infanŝtaton.«


P. S. Ĉi tiu artikolo staras al vi je dispono por aperigo, disaŭdigo kaj alispeca uzo, kondiĉe ke vi post apero, disaŭdigo aŭ tralego dum societa kunveno sendu gazeton aŭ informon al la artikolverkinto: **Rade Petković**, ul. 12 kolovoza 1941, br. 11/II 59000 ŠIBENIK, Jugoslavio

# SE ĈIUJ PATRINOJ DE LA MONDO...

(meditadoj kunlige kun la artikolo de s-ano Rade Petkoviĉ  
»Sepa kontinento«)

(D-ro Gabriel Divjanoviĉ, direktoro de la Observatorio)

Estas vere kortuŝa ideo en la filmo »Sepa kontinento«: krei (almenaŭ por infanoj!) feliĉan mondon, la mondon sen malamo, malsato kaj militoj. La ideo vere estas inda por esti realigita kiel simbolo de la estonta homaro!



La monstro de hidrogena bombo minacas la vivojn de ĉiuj infanoj  
en la mondo!

Multaj el ni, plenaĝuloj, ankaŭ strebas kaj sopiras al tia  
ideala mondo, en kiu regus amikeco, interkompreniĝo kaj huma-  
neco...

Ĉu ne estas nun unika okazo por la esperantistaro montri la praktikan valoron kaj eĉ neceson de Esperanto en tia humana entrepreno, kia estas la »Sepa kontinento«? Esperanto ne venkos per niaj plendaj apelacioj al la estraroj de la ŝtatoj — »Enkonduku oficiale Esperanton en la lernejojn!« ktp — sed, per praktika agado de ni, esperantistoj, en ĉiuj sferoj de la vivo, kaj aparte en tiuj sferoj, kie Esperanto evidente montriĝas logika kaj eĉ necesa.

La ideo pri realigo de infana »Sepa kontinento« povas ankaŭ esti tre instrua por ni, esperantistoj: la ideo mem enhavas en si ĝustecon, kion ĉiu esperantisto portas intime en profundo de sia animo. Ĉu ne?

Sed, jen iom ĉagreniga afero: la ideon ne donis la esperantistoj, sed — neesperantistoj! Se tiu ideo estos realigita, ĝi kontribuos al ideo de Esperanto nekompareble pli multe ol ĉiuj niaj (plej ofte tedaj kaj stereotipaj) esperanto-kunvenoj »inter kvar muroj«, kie ni senfine kaj sterile konvinkigas unu la alian — pri tio, ke Esperanto estas tre saĝa afero...

Ni, esperantistoj, devas fine fariĝi plene konsciaj, ke ni devas iri en la mondon, en publikon kaj tie — ne per tedaj kaj altrudaj vortoj, sed per agado (en konkretaj sociaj kaj homaj problemoj) montri la praktikan valoron ne nur de Esperanto-lingvo, sed ankaŭ la valoron de niaj humanismaj ideoj kaj idealoj, pro kiuj ni, cetere — fariĝis esperantistoj.

Nu, bone, ni ne tro ĉagrenu, ke ni, esperantistoj, ne elpensis la ideon pri »Sepa kontinento«. Kontraŭe, ni ĝoju sincere, ke almenaŭ la aliaj donis la ideon, kie Esperanto povos evidente montri al la mondo sian valoron. Kompreneble, estos tre saĝe kaj utile por Esperanto, se ni ne restos indiferentaj rilate tian brilan ideon, sed se ni sincere helpos ĝin, cetere, kiel ĉiun noblan kaj homaranisman agon utilan por disvastigo de Esperanto.

\* \* \*

La ideo pri »Sepa kontinento«, kvankam ĝin ne donis la esperantistoj, estas ne nur bela, sed tiom riĉa je humanaj kaj homaranismaj pensoj, ke ĝi, per si mem, malfermas novajn, larĝajn horizontojn por mondskala praktika apliko de Esperanto en konkretaj bezonoj de ĉiu homo kaj en bezonoj de la homa socio ĝenerale.

Ne estas nun demando — ĉu ni, esperantistoj, varme salutos la ideon pri la »Sepa kontinento«. Eĉ ne estas demando kiamaniere ni praktike helpos tiun ĉi humanan entreprenon.

Demando estas en tio, **ke ni eĉ plilarĝigu** tiun ĉi brilan kaj enhavoriĉan ideon por utilo de Esperanto!

Vere, ĉi tiu ideo kaŝas en si eblon pri **mondskala** agado de la esperantistoj:

Ni, esperantistoj, ĉiam parolas, ke ni per nia ideo de interkompreniĝo kaj mondamikeco, konstruas firman fundamenton por la **estonta**, pli feliĉa homaro. Ni, en niaj vizioj, rigardas eĉ super la nuna mondo (t. e. super la »mondo de plenaĝuloj«), kiu, bedaŭrinde, ŝajnas esti tro inerta kaj eĉ surda al niaj humanismaj alvokoj.

Ni, fakte, laboras por la estonto.

Kaj kiu nun, sur nia planedo, plej vere (kaj eĉ biologie) prezentas »la estonton«?

Ĝi estas — la infanoj de la mondo!

La infanoj, feliĉe, ankoraŭ ne estas ŝargitaj per la krimulaj »sociaj mankoj« de la plenaĝuloj. Turnante nin al ili, al la infanoj, ni havos pli da ŝanco »krei nian novan, pli humanan homaron«, ol se ni turnos nin, kiel ĝis nun, al rutinitaj plenaĝuloj, kiuj plejparte montriĝis indiferentaj al ĉiuj niaj humanaj alvokoj.

Do, kial ne turni nin al la infanoj?

Cetere, la elstaraj esperantistoj en la mondo ĉiam (kaj prave!) apelaciis »ke ni devas doni iom da freŝa sango al la Esperanto-movado«.

Ĉu entute estas imagebla pli ideala »refreŝigo de la sango« por Esperanto-movado, ol estas agado kun infanoj?!

La ideo, ja, estas pli larĝa ol la teritorio de la insulo »Sepa kontinento«...

Temas pri la infanoj de la tuta terglobo. Per ĉiuj infanoj de la mondo ni povos fari por Esperanto nekompareble pli multe ol per nura ideo pri »Sepa kontinento«.

Kial, do, ni ne havu kuraĝon **iniciati** grandiozan, mondskalan entreprenon:

**La tuta mondo fariĝu la »Sepa kontinento«!**

Sed, ĉu entute en la mondo egzistas tia »magiisto«, kiu povus kolekti tiun ĉi tutan mond-infan-armeon? Ĉu tio entute estas ebla?

Estas ebla. Eĉ ni, esperantistoj, ne devas esti iaj magiistoj  
Ni devas esti nur bonaj organizantoj!

Nu, kiamaniere kolekti la infanojn de la tuta mondo? La infanoj ne estas ja — kokidoj kaj la esperantistoj ne estas kok-patrinoj por povi ĉirkaŭ si laŭvole kolekti siajn »kokidojn«. (Cetere, la ĉarmaj, etaj infanoj — laŭ siaj naiveco kaj infana senkulpeco — vere iom similas al la delikataj, etaj kokidetoj...).

Kiamaniere, do, solvi la ĉefan problemon pri mobilizo de la infanoj por kreado de la estonta, pli bona mondo — Esperanto-mondo?

\* \* \*

Foje la granda rusa verkisto Leo Tolstoj verkis la kortuŝan rakonton:

La eta paserido falis el sia nesto sur la teron. Tuj alkuris granda hundo kaj volis manĝi la malfeliĉan kaj senhelpan birdeton. Sed, en tiu momento, kiam la hundo jam malfermis sian buŝegon por engluti la povran pasereton — la paserino-patrino ŝetis sin kuraĝe kontraŭ buŝego de la hundaĉo! La paserino-patrino ŝetadis sin tiom atakeme kaj vivo-ofereme kontraŭ buŝego kaj kontraŭ okuloj de la granda bestaĉo, ke ĝi, surprizita, retiriĝis kaj la malfeliĉa pasero-infano estis savita!

La instruo de Tolstoja rakonteto estas ja klara: **la amo de la patrino estas senlima, ĝi estas io vere majesta; la vivo de la infano estas por la patrino pli grava ol ŝia propra vivo!**

\* \* \*

Ni vivas en la kruela mondo, en kiu milionoj da infanoj malsatas, en kiu miloj kaj miloj da patrinoj rigardas senhelpe la delikatajn korpojn de siaj infanoj kruele disŝiritajn per aviadil-bomboj. Eĉ pli! — super ni ĉiuj (kaj super niaj infanoj) »pendas« **la terura minaco de totalitara hidrogenmilito...**

Kiu en tiu ĉi nuna mondo estas la plej senhelpa — kaj la plej helpenda?

Ĝi estas — milionoj de enzorgiĝintaj patrinoj en la tuta mondo.

Kiu helpas al la malfeliĉaj patrinoj de la mondo?

Ĉu la generaloj aŭ politikaj aventuristoj?

Al la patrinoj helpas nur bonaj homoj.

Feliĉe, en ĉi tiu kruela mondo estas ankaŭ iom da bonaj homoj. Inter ili estas — laŭ sia ideo mem — ankaŭ la esperantistoj.

\* \* \*

Ni vivas en la mondo de la plej grandaj (kaj eĉ stultaj!) paradoksoj. En la mondo estas plej diversaj societoj kaj organizaĵoj: siajn klubojn kaj societojn havas — futbalistoj, ŝakistoj, filatelistoj — eĉ fraŭloj-needzigeĵoj, proprantoj de hundoj ktp ktp. Estas eĉ »Kluboj de dikaj homoj« kaj organizaĵoj de ŝtelistoj...

Nur unu organizaĵo ankoraŭ ne estas sur nia planedo:

### **La unuiĝo de patrinoj de la tuta mondo por savo de infanoj en la mondo!**

Ĉu ĝi ne estas tragika por tuta nia civilizo?

Ni havas la societojn por protekti la hundojn kaj bestojn, sed ni ne havas tutmondan organizaĵojn por protekti la patriinojn, kiuj zorgas por la infanoj, kiuj infanoj estos jam morgaŭ — estonta homaro!!

Ĉu jam ne estas lasta tempo por ke ni, homoj sur ĉi tiu planedo, kreu la organizaĵon, kies humana kaj nobla celo estos helpi la patriinojn enzorgigintajn pri la sorto de siaj infanoj?

Ne temas ĉi tie nur pri nura helpo en okazo de milito, malsato aŭ malsano. Temas pri organizita agado de ĉiuj homoj de bona volo, ke entute ĉesu la militoj, ke malaperu malsato en la mondo, ke la patriinoj povu fine senzorge rigardi la sorton kaj estonton de siaj infanoj.

Kiu havas plej grandan — eĉ biologian — intereson, ke la infanoj de la mondo vivu feliĉe — sen milito kaj sen aliaj teruraĵoj je kiuj abundas nuna socio?

Ĝi certe estas la **patrinoj de la mondo**.

La tutmonda unuiĝo de la patriinoj povus ludi grandiozan rolon por ĉesigo de la militoj kaj por forigo de antagonismoj inter ŝtatoj kaj popoloj: en intereso de siaj propraj infanoj la patriinoj de la tuta mondo, en reciproka interkonsento (laŭ la statuto de la »Unuiĝo de patriinoj«) edukus siajn infanojn en la ideoj de amikeco kaj interkompreniĝo kun ĉiuj infanoj en la mondo.

Ĉu tiuj ĉi idealoj ne estas, fakte, veraj esperantistecaj idealoj?

Ĉu entute nun estas ia dubo pri tio, kiun lingvon (kiel unuan krom la gepatra) lernus tiaj infanoj?

Ĝi certe estus — **Esperanto**, la ununura lingvo digna je la mondorganizaĵo, al kiu apartenas iliaj patriinoj!

Ĝi estus bona unua (kaj realigebla!) paŝo por krei »novan homaron«, je kiu ni ĉiuj sopiras.

Kiu iniciatu tiun ĉi mond-skalan agadon?

La verkisto kaj filmisto surprizis nin agrable per la ideo de »Sepa kontinento«. Ni, esperantistoj, salutu tiun ĉi belan ideon kaj faru la sekvan paŝon — pli larĝan, **mondskalan**:

**Ni, esperantistoj**, iniciatu fondiĝon de la »Unuiĝo de patrinoj de la tuta mondo«!

Se ni, esperantistoj, montriĝos bonaj organizantoj, post malpli ol deko da jaroj **milioj da infanoj parolos Esperanton!** Eĉ pli — milionoj de junaj homoj — estontaj plenaĝaj civitanoj de la mondo — estos edukitaj, jam de frua infanaĝo, en esperantistaj idealoj de monda interkompreniĝo kaj monda amikeco!

Ĝi vere estus tiu »freŝa sango«, kiu estas bezona por la Esperanto-movado...

La patrinoj de la mondo, bone organizitaj, prezentas **kolosan moralan kaj socian forton** en la mondo. Tiu ĉi kolosa forto portas en sia profundo la tutsamajn idealojn, kiujn portas en profundo de sia animo ĉiu esperantisto — la pli bonan, pli sekuran kaj pli feliĉan vivon de ĉiuj homoj surbaze de tutmonda amikeco, interkompreniĝo, humaneco kaj — paco.

Kial ni, esperantistoj, ne mobilizu tiun ĉi kolosan forton de la mondo por niaj komunaj idealoj?

Se ni volas fari ion **realan** en la mondo, ni, fine, eliru el »inter niaj kvar muroj«...

\* \* \*

Kompreneble, la afero sukcesos **NUR** se ni, esperantistoj, klopodos aligi al tiu ĉi Unuiĝo kiom eble plej multe da **NEesperantistoj**. (Ni estu paciencaj kaj ne tedu al ili per deviga Esperanto-lerno, ni estu ja feliĉegaj, ke iliaj infanoj, se ne morgaŭ, certe postmorgaŭ — parolos Esperanton!).

Estas **ĉefe**, ke ni, esperantistoj, **iniciatu** la aferon kaj konstante certa nombro da esperantistoj estu aktiva en ĉi tiu tutmonda organizaĵo, kiu ne estu **nure** esperantista, sed apartenu vere al la tuta mondo. (Cetere, ni ankaŭ, kune kun nia lingvo Esperanto, apartenas al la mondo kaj ne la mondo — al ni).

Al tia humanista Unuiĝo certe aliĝos multaj elstaraj personoj en la tuta mondo: verkistoj, sciencistoj, artistoj, pedagogoj, filozofoj ktp.

Kompreneble, la **patrojn** oni ankaŭ devas mobilizi: ili estu »apogmembroj« de la Unuiĝo. Ĉiu bona patro (t. e. tiu, kiu



meritas ĉi nomon) plenkore helpos tian Unuiĝon, ĉar temas ankaŭ pri liaj infanoj. Nome, la Unuiĝo havos ŝancon — pro sia nure humana karaktero — pli bone prosperi, se ĝi, laŭ statuto, estos »patrina« kaj ne »patra« Unuiĝo, ĉar tiam en ĝi estos certe pli multe da humanismo kaj malpli da politiko (—tion lastan oni nepre devas eviti, por ke la organizaĵo restu por ĉiam humanisma kaj tuthomara).

La patroj devus esti la plej firmaj apogantoj kaj helpantoj de la Unuiĝo. Cetere, certe troviĝas multaj patroj, kiuj estas ne

nur kore sed ankaŭ mone riĉaj, kiuj volonte kontribuos — unu foje por ĉiam — apartajn donacaĵojn por la Unuiĝo. Samtiel multaj karitaj kaj humanaj institucioj kaj fondaĵoj certe kontribuos rimarkindajn donacaĵojn por tia unika humana Unuiĝo!

Aparte estas grave, ke la esperantistoj turnu sin al la **elstaraj personoj** en la tuta mondo, kiuj estas konataj pro siaj humanismaj agoj kaj meritoj. Tiaj personoj estas ja sufiĉe nombraj en la mondo: ni donu nur unu ekzemplon — la tuta mondo konas sinjorinon **Josephine Baker**, la mondifaman artistinon, kiu adoptis dekon da infanoj (negrojn, blankulojn, ĉinojn, indianojn!) kaj zorgas kortuŝe patrinece pri ili. Sed, kio estas eĉ pli grave — ŝi edukas ilin en ideo de tutmonda amikeco kaj amo! Se tiaj elstaraj



Sinjorino **Josephine Baker** modela patrino de la mondinfanoj

personoj troviĝus inter estraranoj de nia »Unuiĝo« — ĝi vere fariĝus unika kaj respektinda tutmonda movado!

Cetere, tiaj personoj, jam per siaj bonaj faroj, estas ja idealaj »civitanoj de la nova mondo«! Ni, esperantistoj, nepre devas turni nin persone al tiaj meritaj mondagantoj: estas escepte grave, ke ĝuste tiaj elstaraj personoj informiĝu kian moralan valoron havas Esperanto kiel ideo! Ili — se ne lingve — almenaŭ ideo ektaksos Esperanton, trovante ke ĝi, ne nur per vortoj aŭ lingvo — sed per konkretaj humanaj kontribuoj promesas feliĉon kaj bonfarton al la tuta homaro.

Krom la elstaraj personoj en la mondo estas ankaŭ multaj respektindaj organizaĵoj kun same humanaj kaj noblaj celoj — ekzemple: »Ruĝa kruco«, »Mondcivitanoj«, diversaj virinaj organizaĵoj ktp, kun kiuj oni devus nepre fari plej amikan kaj intiman kontakton kaj kunlaboron.

Ni firme esperas, ke niaj plej grandaj Esperanto-organizaĵoj, UEA kaj SAT, kun ĝojo salutos tian larĝan movadon, agantan en kadro de Esperanto-ideo kaj mondscale propagandantan nian Esperanton.

Kaj fine, se ni esperantistoj en tiu afero faros ion valoran por la mondo, certe ankaŭ la **Organizo de Unuiĝintaj Nacioj** ne restos indiferenta al la granda kontribuo, kiun la esperantistoj donis al la humaneco en la mondo.

### **Rimarko de la redakcio:**

La redakcio de la revuo »HOMO kaj KOSMO« petas la legantojn esprimi siajn opinion, kritikon kaj sugestojn pri ĉi tiu propono de nia redaktoro Divjanoviĉ. Ni petas ĉiujn samopiniajn redakciojn de la Esperanto-revuoj represi—almenaŭ en esencaj trajtoj — la supran artikolon de nia redaktoro.

Aparte la aŭtoro de ĉi artikolo turnas sin persone al nia vigla kaj entreprenema s-anino **Ada Fighiera-Sikorska**, la simpatia ĉefredaktorino de nia ŝatata »**Heroldo**«, ke ŝi persone apogu (kaj, laŭtrove, eĉ ampleksigu...) la »mondsavajn zorgojn« de unu astronomo. cetere, ŝia malnova amiko...

## NOVAJ AMIKO - KARTOJ

Ĵus aperis en eldono de UEA novaj, traf-aspektaj salutkartoj por la Semajno de Internacia Amikeco. La novaj kartoj portas unuflanke foton de manpremo inter du manoj diversrasaj — unu blanka, la alia nigra — kaj aliflanke la simbolon de la Semajno de Internacia Amikeco: manpremo kun verda stelo kaj la teksto »Amikeco trans limoj«. Jam sen vortoj la bildo trafe esprimas la ideon de internacia interkompreniĝo.




Esperantista poŝtkarto montranta simbolece la amikecon inter ĉiuj homoj en la mondo

La Semajno de Internacia Amikeco — lanĉita de UEA antaŭ kelkaj jaroj laŭ iniciato de s-ro Erik Carlén — fariĝas ĉiam pli konata tra la mondo, en kaj ekster la Esperanto-movado. Ĝi estas ĉiam la lasta kompleta semajno en februaro, tio estas en 1973 de la 19a ĝis la 25a de februaro.

La novaj poŝtkartoj estas mendeblaj rekte ĉe Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002) aŭ

ĉe la kutimaj libroservoj. Prezo: po 0,25 gld. plus sendokostoj 10%. Minimuma poŝta mendo: 10 ekzempleroj.

Kvankam eldonitaj unuavice por la Semajno de Internacia Amikeco, la kartoj estas bone uzeblaj ankaŭ en aliaj okazoj tra la jaro.



## VIDINDAĴOJ EN LA ĈIELO

en julio, aŭgusto  
kaj septembro 1973.

### I Videbleco de la planedoj:

**Merkuro** estos videbla ĉirkaŭ la 8-a de aŭgusto matene (tuj antaŭ sunleviĝo) super orienta horizonto.

**Venuso** videbla kiel brila vespera astro post sunsubiro super okcidenta horizonto.

**Marso** videbla kiel brila ruĝa astro post noktomezo super sudo-orienta horizonto.

**Jupitero** estos plej proksima al la Tero (»opozicio«) la 30-an de julio kaj tiam estos videbla tutan nokton antipode al la Suno (do, kiam la Suno vespere subiĝos, Jupitero leviĝos super orienta horizonto).

**Saturno** en nekonvena situo por observado, ĉar en tiu tempo troviĝos »malantaŭ« la Suno.

### II Fazoj de la Luno:

	Unua kvar.	Plenluno	Lasta kvar.	Novluno
<b>Julio:</b>	la 7-an,	la 15-an,	la 23-an,	la 29-an
<b>Aŭgusto:</b>	la 5-an,	la 14-an,	la 21-an,	la 28-an
<b>Septembro:</b>	la 4-an,	la 12-an,	la 19-an,	la 26-an

**III La aŭtuno komenciĝos** la 23-an de septembro je 4 horoj 21 minutoj (laŭ la griniĉa tempo).

# NOVAĴOJ EL SCIENCO KAJ MONDO

## ESPERANTISTO MALKOVRIS KOMETON

Unu el la organizintoj de la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo (Belgujo), la astronomo **A. Heck** (26-jara), kune kun franca esploristo, malkovris novan kometon. La malkovro estas konfirmita de la Internacia Oficejo de la Universitato de Harvard (Usono). La nova kometo nomiĝas »Heck-Sause«. Nia bildo pre-

zentas s-anon A. Heck. (Laŭ »Heroldo de Esperanto«).



Dekstre: esperantisto **A. Heck**, malkovrinto de la kometo

## INTERNACIA METEOTAGO

(inĝ. **Tomislav Vučetić**, meteologo\*)

La meteologoj de la tuta mondo festas la 23-an de marto kiel sian festotagon — Internacian tagon de meteologoj. Ĉiujare la meteologoj festas sian festotagon sub ia devizo el kampo de sia aktiveco. Pasintjare ĝi estis »Protekto de homa medio«, ĉi jare »Cent jaroj de internacia kunlaboro en meteologio«.

Ĉiutage milionoj da meteologoj tutmondaj kunlaboras en siaj komunaj taskoj. Senkondidere la politikajn konvinkojn, naciajn aŭ rasan apartenon, jam cent jarojn (de la unua internacia kongreso en 1873) la laboro de meteologoj estis trapenetrita per unueca metodiko, kaj same estontece ilia laboro estos inspirita per ideoj de paco kaj bonfarto de la homaro.

La monda meteologia organizaĵo (WMD), kiel specialigita agentejo de Unuiĝintaj Nacioj, nombras 123 ŝtato-membrojn, inter kiuj estas ankaŭ Jugoslavio, kaj 13 memadministratajn teritoriojn.



Meteologo  
inĝ. **Tomislav Vučetić**

Internacian meteologian kunlaboron ni rekontas en ĉiuj meteologiaj sektoroj:

— sen rapida interŝango de meteologiaj informoj inter ĉiuj landoj de unu hemisfero oni ne povas imagi eblecon de prognozado de estonta veterstato kaj ellaboro de atentigoj por sekureco de mara, aera kaj alia trafiko;

— tian kunlaboron ni renkontas senkosidere ĉu temas pri esploro de natura aŭ urba malpureco de homa medio;

— en esploro de klimato de landoj kaj kontinentoj;

— en fiksado de laŭleĝeco de vetero kaj klimato de unuopaj regionoj, regionaj maroj kaj oceanoj;

— en esplorkomunlaboroj aŭ sciencaj projektoj ĉirkaŭ preparoj kaj realigado de mondsistemo de meteologia vaĉado (WWW), aktiva partopreno en fondo de eŭropa centro por malprosima prognozo de la veterstato (ĝis 10 tagoj), en preparo de eŭropa instituto por artefarita influo al la vetero (defendo kontraŭ hajlo, forpelo de nebuloj ĉe aerodromoj, artefarita stimulado de fajloj).

Multnombraj estas ankaŭ pliaj meteologiaj aktivecoj: agrometeologiaj esploroj, veterprognozoj kaj kunlaboro en batalo por riĉaj rikoltoj en agrikulturo, mezurado kaj konjektado de akvovivado kaj akvotrafiko, esploro de akvokvalito ktp., sed ni ne daŭrigos la nombradon. Prefere ni nun gratulu la festotagon al milionoj da meteologoj disvastigitaj tra la tuta mondo kun unu nura deziro: fruktodonan kunlaboron, pacon kaj komunan prosperon sur la Tero kaj en la Kosmo!

---

\* Rimarko: ni preferas skribi (laŭ »Plena ilustrita vortaro«) la vorton »meteologo« kaj »meteotago« anstataŭ »meteorologo« ktp.

# INTERESAĴOJ kaj KURIOZAĴOJ el la NATURO



## KELKAJ PENSOJ OKAZE DE LA KOPERNIK-JARO

La mondo celebras la Kopernik-jaron sub la aŭspicio de UNESCO. En multaj landoj, ne nur en Pollando, okazis manifestacioj kaj en la paroladoj aŭdiĝis la opinio, ke tiu genia homo kaj sciencisto ne apartenas al unu lando, sed al la tuta mondo. Laŭ nia opinio prave oni konsideras Kopernik mondcivitano. En la tempo, kiam li vivis, studis kaj laboris, eblis libera vojaĝado de lando al lando, de urbo al urbo, de universitato al universitato, almenaŭ por tiuj, kiuj disponis pri la financaj rimedoj kaj kiuj regis la siatempan universalan lingvon, la latinan.

Jes, antaŭ 500 jaroj ekzistis por sciencistoj kaj studentoj komuna lingvo. Aparte ni esperantistoj memoru pri tiu fakto, kiu estas por ni kaŭzo ankaŭ celebri la 500-an datrevenon de la pola astronomo kaj pensulo. Cetere, la verko de Kopernik »De revolutionibus...« estis unue presita en Nürnberg. Tiu fakto eble estis

la kaŭzo, ke la ĉefa Kopernik-celebrado de FRG okazis ĝuste en tiu urbo, la 1-an de februaro 1973. Simile, do, al Esperanto kaj Zamenhof, la urbo Nürnberg ludis ankaŭ rilate al Kopernik kaj sia verko certan rolon... Kaj Pilo-Press volis atentigi pri tio.

(Laŭ PILO-PRESS 9/1973)

### Rimarko de la redaktoro:

Tiujn, kiuj ankoraŭ ne scias, ni devas informi, ke PILO-PRESS estas internacia E-informservo, kiu regule ĉiusemajne, jam la trian jaron, eldonas bultenojn ŝike multobligitajn kun plej freŝaj informoj pri E-okazintaĵoj. Ĝi estas la sola tiaspeca informilo en Esperantujo. Jara abonprezo estas 20.— GM. Interesatoj bv. turni sin al la redaktoro kaj eldonisto: **Ludwig Pickel**, Postfach 21113, D-85 Nürnberg 2, Germanio. Ni povas nur rekomendi ĝin kaj samtempe gratuli al s-ano Pickel.



## 58-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

28-a de julio - 4-a de aŭgusto 1973

### 58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 28. 7.—4. 8. 1973

**Alta Protektanto: Prezidento de SFR Jugoslavio, Josip Broz Tito**  
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002,  
Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO n-ro 4.

20 marto 1973

#### Kotiztabelo post la 1-a de aprilo 1973

ned. gld.

1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . .	108,—
2. Kongresano indiv. membro kun Jarlibro (MJ) . . . . .	93,—
3. Kongresano individua membro (MA) . . . . .	78,—
4. Edz (in)o de kongresano en kategorio 1 . . . . .	75,60
5. Edz(in)o de kongresano en kateg. 2 aŭ 3 . . . . .	63,—
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . . . .	32,40
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara . . . . .	54,—
8. Blindulo . . . . .	43,20

#### Aperis dua Oficiala Bulteno

Ĉiuj kongresaliĝintoj jam ricevis la duan Oficialan Bultenon. Tiu ĉi 32-paĝa broŝuro estas kolekto da ĝeneralaj informoj, mapoj kaj fotografaĵoj pri diversaj kongresaj aktivecoj, akompanata de mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo kaj la postkongreso.

#### Fervoja rabatilo denove en Esperanto

Kiam en 1971 por la unua fojo aperis klarigaj tekstoj sur la fervoja rabatilo ankaŭ en Esperanto, oni povis esperi pri bona precedenco. Efektive, ĉi-jare la jugoslava fervojo sekvis la ekzemplon, kaj tiamaniere kongresanoj ricevos esperantlingvan rabatilon por la dua fojo en la historio.

#### Ĉu ne pli da infanoj?

Ĝis la finredakto de tiu ĉi komunikado venis nur 21 aliĝoj por la 13-a Internacia Infana Kongreseto 1973 en Beograd. Laŭlanda



superrigardo aspektas jene: Jugoslavio (8), Britujo (3), Italujo (3), Japanujo (2), Grekujo (2), Danlando (2) kaj Usono (1). Ĉu ne ekzistas pli da interesitaj infanoj? Certe jes!

### **Filmoj por la filmvespero**

Anoncoj pri esperantlingvaj filmoj konvenaj por dumkongresa prezentado estas bonvenaj ĉe la respondeculo S-ro, R. Petrović, p/a LKK 58-a UK, Terazije 42, 11000 Beograd, Jugoslavio.

### **Kongresa glumarko en la kongreslando**

El la tuta eldonkvanto de la kongresaj glumarkoj plenaj du-trionoj jam vendiĝis en Jugoslavio mem. Tia populareco necesigis reeldonon de pliaj 30.000 glumarkoj. Prezo por 10-marka folio estas 0,50 gld (1 internacia respondkupono); por Nederlando 0,57 gld + sendokostoj 10%.

### **Bankedo en Metropol**

La oficiala bankedo de la Kongreso okazos en la luksa hotelo »Metropol«, tre proksime de la kongresejo. La menuo konsistas el diversaj varmaj kaj malvarmaj pladoj, inter ili jugoslavaj specialaĵoj, trinkaĵoj kaj aliaj bongustaĵoj. La prezo estos 25,— gld (150 n. din) por ĉiu persono.

### **Du pliaj karavanoj**

Allogan programon promesas organizantoj de la belga karavano al Beograd (G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, 8310 Brugge 3, Belgujo). Por skandinavaj esperantistoj ekzistas ankaŭ plia eb- leco: trisemajna aŭtobusvojaĝo sub la organizo de la turisma servo de N. E. L., Boks 942, Oslo sentrum, Norvegujo.

### **Informvesperoj pri Jugoslavio**

Por la Esperanto-gazetoj, radistacioj kaj la lokaj grupoj, kiuj preparas informadon pri la kongresa lando, estas je dispono pre- taj koncizaj artikoloj. Oni povas skribi al S-ro M. Gjiwoje, P. p. 5025, 41040 Zagrebačka Dubrava, Jugoslavio, aldonante internacia- n respondkuponon.

### **Feriestado en Primošten**

Internacia Kultura Servo (Amruševa 5, 41000 Zagreb) anoncis organizon de 7-taga kultura feriado en la Esperanto-kampadejo de Primošten, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1973. La kompleta prezo estas 40 usonaj dolaroj, aŭ, inkluzive de la vojaĝo el Beo- grad, 63 usonaj dolaroj.

### **Nova peranto en Finnlando**

En Finnlando transprenis la oficon de la kongresa peranto S-ro Harri Laine, Tor ihaukant. 8 A 19, SF 02620 Karakallio, Finnlando.

Ŝanĝiĝis ankaŭ la oficiala kontaktadreso por Hunagarujo: Hungara Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 193, H 1368 Budapest 5.

### **Ekskursprogramo**

Aparte bunta estas ĉi-jare la oficiala ekskursprogramo. Krom ĉenurbaj rondvojaĝoj la LKK elektis 6 diversajn celojn por la tuttaga ekskursado je ĵaŭdo, la 2-a de aŭgusto 1973. Detaloj aperas en la Oficiala Bulteno.

### **Pedagogoj kunvenos en Maribor**

La VII-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj la Internacia Instruista Konferenco de ILEI okazos de la 18-a ĝis la 27-a de julio 1973 en Maribor. Adreso de la organiza komitato estas: Tomanova ul. 19, 62000 Maribor, Jugoslavio.

### **Statistiko (20. 3. 1973)**

Argentino 1, Aŭstralio 10, Aŭstrujo 16, Belgujo 27, Brazilo 3, Britujo 71, Bulgarujo 23, Ĉehoslovakio 4, Danlando 11, Egiptujo 2, Finnlando 28, Francujo 124, FR Germanujo 67, Grekujo 3, Hindujo 1, Hispanujo 32, Hungarujo 9, Islando 2, Israelo 4, Italujo 62, Japanujo 30, Jugoslavio 88, Kanado 16, Koreujo (Suda) 5, Meksiko 3, Nederlando 72, Norvegujo 11, Nov-Zelando 3, Pollando 16, Portugalujo 4, Rumanujo 2, Sovetunio 9, Svedujo 43, Svisujo 10, Turkujo 1, Usono 83, Venezuelo 1.

**Entute 897 aliĝintoj el 37 landoj.**

## **JUGOSLAVIO INTER LA 38-a kaj 58-a UNIVERSALA KONGRESO**

La 38-a U. K. en Zagreb sukcesis. Ĝi logis per pluraj faktoj: la unuan fojon okazis la Universala Kongreso en unu socialista lando, la unuan fojon sur Balkano, la unuan fojon pluraj okcidentlandaj kongresanoj konatiĝis kun socialisme organizita vivo. Ĉio aktuala en 1953, sed eĉ ne unu el tiuj faktoj estas aktuala en 1973, la tempopunkto de la Universala Kongreso en Beograd.

Ĉu, do, ne penvaloras veni Jugoslavion nun, kiam ĝi apartenas al jam konata turisma lando, kiu larĝe malfermis sian pordon al miloj kaj miloj da eksterlandanoj?

Se ni ne estas intence miopaj, ni bone scias, ke la Kongreson vizitas esperantistoj, ne nur pro la kongresa programo, sed ankaŭ pro multaj flankaj logaĵoj, inter kiuj turismaj verŝajne okupas la unuan lokon.

En 1953 Primoŝteno estis eta vilaĝo, en kiu abundis nur ŝtonoj, muŝoj kaj azena iaado, sen unu sola hotelo, sen asfaltita vojo, sen elektro-lumo kaj sen la plej pala imago, ke tie iam estos esperantista kampadejo. Nun en Primoŝteno pompas kelkaj altrangaj hoteloj, asfaltitaj ŝoseoj, dancterasoj, ĉio nokte brile lumigita. Esperantistaj tendoj ne pompas, la pinbranĉaro komplete kovras tiun tre malmultekostan kaj agrablan renkontejon, kie preskaŭ el tendo eblas salti en maron. En tri unuaj semajnoj de julio tie okazas seminario por esperantistoj pedagogoj, en kies B- kaj C-grupoj ĉiuj prelegoj estas nur en Esperanto kaj post finita instruado sekvas ekzameno. La seminario ne estas kurso por progresintoj, ĝia instruprogramo entenas ankaŭ objektojn kiaj literaturo, traduk-arto, historio kaj organizo de la movado. Ĉiu kandidato, farante ekzamenon, ricevas diplomon. En multaj landoj ekzistas propra ekzamen-komisiono, sed lerni en ombro de pinarboj apud lazuraj marondetoj kaj fari ekzamenon en alia, ne la propra lando — ĉu tio ne estas loga?

En 1953 Danubo ĉe la loko Ĝerdap estis sovaĝa flukurbiĝo inter rifoj kaj krutaĵoj, malfacile navigebla. Nun tie estas unu el la plej grandaj eŭropaj kluzoj, finkonstruita fare de du ŝtatoj kaj liganta per bela ponto la du najbarajn landojn: Jugoslavion kaj Rumanion. Viziti la kluzon, kie apud naturbelaĵoj kaj teknikaj mirakloj ankaŭ historio spiras en tabulo de la romia imperiestro Trajano, en arkeologia trovitaĵo Lepenski Vir, kie kulturo, multe pli aĝa ol la romia kaj greka, postlasis siajn skulptaĵojn kaj kie el la groto kvazaŭ rigardas la kluzon antaŭ miliono da jaroj estingiĝinta brilo de la prahoma okulo, kiu tie lasis unuajn mallerte prilaboritajn ŝtonojn, ne koninte ankoraŭ la fajron — ĉu tio ne estas loga?

En 1953 en Jugoslavio ekzistis nur du-tri asfaltitaj ĉefvojoj. Nun la landon trapasas ĉiupaŝe asfaltitaj ŝoseoj. Antaŭ 20 jaroj en la tuta lando estis eble deko da moteloj. Nun je ĉiuj keldeko da kilometroj troviĝas iu motelo, pluraj konstruitaj en nacia stilo, aŭ kiel fiŝkabano, arbardomo, aŭ moderna vitra konstruaĵo. Ĉie havebla bona manĝaĵo, ankaŭ naciaj specialaĵoj — ĉu tio ne estas loga?

En 1953 en Serbio komenciĝis riparlaboroj en malnovaj bizancaj monaĥejoj kaj preĝejoj. Nun tiuj antikvaj konstruaĵoj

brilas en sia historia majesto, riparitaj, ordigitaj, kapablaj akcepti vizitantojn, kiuj nur en tiu parto de Eŭropo povas vidi konservitajn mezepokajn bizanstilajn templojn, plenaj de apartaj tre impresaj fresko-pentraĵoj. Ĉu tio ne estas loga?

Venu, vi konvinkigos mem.

Ĉefdelegito de UEA por Jugoslavio  
**Emilija Lapenna**

### **Kalendaro de E-aranĝoj en Jugoslavio en 1973**

- 5—22. VII Pedagogia Esperanto Seminario en Primošteno (por komencantoj kaj progresintoj, eblas fari ekzamenojn A, B, C). Informojn donas: Kroatia Esperanto Ligo, 41 000 Zagreb, Amruševa 5/I
- 18—20. VII La VII-a kunordiga konferenco por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Adreso de la sekretario de Konstanta Organiza Komitato: Ludoviko Prebil, Tomanova 19, 62 000 Maribor
- 20—26. VII II. Kongreso de ILEI en Maribor. Adreso la sama.
- 21—27. VII 29-a Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo. Adreso: 29-a IJK, 71000 Sarajevo, V. Pelagića 8/I
- 24—27. VII Antaŭkongreso en Ljubljana. Detaloj en la Dua oficiala bulteno. Adreso: Esperanto-societo Ljubljana, Tavčarjeva 2, 61001 Ljubljana, P. p. 401
- 24—28. VII La 41-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj en Beograd. Adreso: KUD »Svetislav Anđelić«, Jevrejska 24, 11000 Beograd aŭ Vladislav Stefanović, Koste Taušanovića 8, 11050 Beograd
28. VII — 4. VIII **La 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd.** Adreso: 11000 Beograd, Terazije 42 aŭ Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando
28. VII — 4. VIII La 13-a internacia infana kongreseto en »Pionira urbo« Beograd. Informojn petu ĉe la antaŭa adreso de la 58-a U.K.
- 6—13. VIII La postkongresa feriado en Primošteno. Adreso: Internacia Kultura Servo, 41000 Zagreb, Amruševa 5/I
- 1—7. X Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) Zagreb—Sisak—Karlovac. Adreso: IKS, 41000 Zagreb, Amruševa 5/I
- 1—7. X II. Internacia renkontiĝo de infanoj Zagreb. Adreso kiel ĉe la antaŭa.

## RADIOSTACIO ZAGREB

### jam 20 jarojn elsendas en Esperanto

Amasiĝis ĉi jare en Jugoslavio tiom da jubileoj, ke ni ne povas prisilenti la ĉefajn, precipe tiujn, kiuj estas gravaj por nia movado ĝenerale.

En aprilo 1953 komenciĝis regula elsendado de Radio Zagreb en Esperanto kiel aldona aktivado, precipe informa, turnita al eksterlando pri la tiam okazinta 38-a Universala Kongreso de



La brava Esperanto-ekipo ĉe Radio-Zagreb: la gvidantino **Emilija Lapenna** (maldekstre), teknika reĝisoro **Vlado Jurkoviĉ**, (staranta) junaj studentoj-parolistoj **Darinka Antoniĉ** kaj **Nikolo Matijeviĉ**

Esperanto en Zagrebo. Dank' al persistemo de kelkaj »ĝisostuloj« tiuj elsendoj de tiam okazas seninterrompe regule ĉiujaŭde. Iom da statistiko en unu nura frazo: ĝis nun estas elsenditaj 1060 programoj aŭ 16.000 minutoj aŭ 266 horoj, por kiuj estis preparitaj tekstoj sur 1500 folioj. Dum 20 jaroj konstante en la elsen-

doj kunlaboras nur 2 membroj de la redakta komitato: Emilija Lapenna (kiu 12 jarojn gvidas la elsendojn) kaj Vlado Jurković.

Parolitoj pli ofte ŝanĝiĝis, sed ĉiam estis plejparte junuloj. Unu el la parolitoj, inĝ. Damir Mikuličić, unu el la plej aktivaj junaj astronomoj esperantistoj, kunaŭtoro de la »Tragedio en la Universo« ktp. partoprenis kiel parolito en la elsendoj ekde 1963, kaj kvankam li finis la studadon ankoraŭ konstante aktivas kiel parolito.

Ĉi okaze ni volas aparte substreki unu aferon: la rolon, kiun ludis kaj ludas en la E-elsendoj la gvidantino **Emilija Lapenna**, kiu ĉiam montris komprenemon por nia aktiveco, precipe kiam ŝi devis recenzi ĉiun novan numeron de »Homo kaj Kosmo«.

E-elsendojn de Radio Zagreb aŭskultas pli multaj eksterlandaj esperantistoj ol la enlandaj, konkludante laŭ ricevitaj leteroj, malgraŭ nekonvena elsendo-horo (noktomezo). Ni gratulas al la E-stabo de Radiostacio Zagreb kaj al niaj legantoj ni varme rekomendas aŭskulti la E-elsendojn, precipe en nuna kongresa jaro, kiam estas necese informiĝi iom pli pri la kongreslando. Krom tio ni rekomendas de tempo al tempo skribi ankaŭ gratulkarton.

**Marinko Ĝivoje**

### **Sciencopopulariga verko SENĜENAJ DIALOGOJ en pluraj lingvoj**

Je la jarfino aperos ĉe la eldonejo Matignon (Parizo) franca traduko de la sciencopopulariga verko »Senĝenaj dialogoj«, verkita originale en Esperanto de nia kunlaboranto Alberto Fernández (fragmentoj de tiu verko aperis en nia revuo en daŭrigoj).

Tiu eldono okazos eksterserie sub la titolo DIALOGUES INSOLITES. Versio en nederlanda lingvo estas ankaŭ preparata. Pluraj verkoj originale verkitaj en Esperanto estis tradukitaj en ĝis 20 lingvoj. Aliflanke Esperanto ankoraŭ pli ofte servis kiel pontolingvo por literaturaj tradukoj, kie rekta tradukado ne estis ebla. Ankaŭ per tiuj procedoj riĉiĝis la trezoroj de verkoj en Esperanto.

(Laŭ »Internacia Gazetara Servo«)

# **Premia konkurso**

de la revuo »HOMO kaj KOSMO«

La respondoj al la demandoj el N-ro 4/1972:

**Demando:** 1. En kiu urbo kaj en kiu jaro naskiĝis fama astronomo Nikolao Kopernik?

**Respondo:** en la urbo Torunj (Pollando) en la jaro 1473.

**Demando:** 2. Kian nomon havas la aŭtomata kosma veturilo-esplorilo, kiun sovetianoj surlunigis la 21-an de januaro 1973?

**Respondo:** »Lunohod 2«

**Demando:** 3. Kiu giganta planedo dominos dum tuta nokto per sia brilo en la ĉielo meze de ĉi jaro (julio-aŭgusto)?

**Respondo:** Jupitero.

**Demando:** 4. Kian nomon havis la lasta kosmoŝipo, kiu surlunigis homojn al lunsurfaco?

**Respondo:** »Apollo 17«.

**Demando:** 5. Kiu brila planedo meze de ĉi jaro estos pli kaj pli bone videbla frue vespere en okcidento post sunsubiro?

**Respondo:** Venuso.

## **LA REZULTO DE LA PREMIA KONKURSO**

el la numero 3/1972:

En premia konkurso de N-ro 3/1972. konkuris 39 legantoj. Al ĉiuj kvin demandoj respondis ĝuste 31 legantoj. La loto decidis pri la sekva ranglisto:

1. **Boleslav Skalinski** (Pollando), 2. **Giancarlo Nitti** (Italio), 3. **Guy Beauchamps** (Belgio), 4. **Anatolij Jarcev** (USSR), 5. **Jan Hrdička** (Ĉeĥoslovakio).

## **NOVA PREMIA KONKURSO**

Provu respondi al la sekvaj kvin demandoj:

1. Kiu belga astronomo-esperantisto antaŭ kelka tempo famiĝis pro malkovro de nova kometo?

2. Kiu astronomo-esperantisto famiĝis pro malkovro de »ringo de la Tero« kaj du »polvaj satelitoj« de la Tero? (En lasta tempo la preso de la tuta mondo raportis pri tio, sed nia revuo raportis jam en la jaro 1968!).

3. Kiuj tri plej brilaj planedoj estos videblaj vespere dum ĉi aŭtuno?

4. Je kiu dato ĉi jare (en monato junio) okazos unu el la plej longaj suneklipsoj en ĉi tiu jarcento?

5. Sur kiu insulo (kaj en kiu maro) oni organizos la »Sepan kontinenton« — la amikan renkontejon de la infanoj el la tuta mondo?

La premioj por unuaj kvin solvontoj estos la Esperanto-libroj laŭ propra elekto: »**SENĜENAJ DIALOGOJ**«, »Tragedio en la Universo«, »Feliĉigaj ferioj«, »Sekretoj de la marestajoj«, »Totala suneklipso«. (Tiu, kiuj jam gajnis premie menciitajn librojn, povos, laŭdezure, ricevadi senpage, kiel premion, unu jaron nian revuon »HOMO kaj KOSMO«).

Se pluraj solvoj estos egalĝustaj, pri la ranglisto decidos, kiel kutime, la loto. La solvojn oni sendu al la adreso: Astronomia Opseratorio, 41103 ZAGREB, Opatička 22, poŝtfolio 38, Jugoslavio.

---

**Montru la revuon »HOMO kaj KOSMO« al viaj esperantistaj amikoj en la Esperanto-societoj, Esperanto-kursoj kaj aparte en la lernejoj, kie estas instruata Esperanto!**

---

## DEMANDOJ — RESPONDOJ

La leganto R. K. el Split (Jugoslavio) demandas: »Hodiaŭ mi legis en ĵurnalo sensacian informon, ke pola astronomo d-ro **Kazimierz Kordylewski** malkovris la ringon de la Tero kaj ankoraŭ du Lunojn! Ankaŭ estis publikite, ke d-ro Kordylewski estas esperantisto! Ĉu tio estas vero?



**Respondo:** estas, feliĉe, la vero! Pri la ideo de la astronomo-esperantisto d-ro Kordylewski — ke nian Teron ĉirkaŭas polvaringo kaj du polvaj »Lunoj« nia revuo publikigis artikolon en la N-ro 4 de la jaro 1968. Ĉar via letero venis en lasta momento, kiam ĉi numero estis jam preparita por presejo — ni donos pli detalajn informojn pri tiu ĉi interesa malkovro en iu el sekvaj numeroj!

## EL LA REDAKCIO

Per ĉi tiu numero nia revuo enpaŝas en la 11-an jaron de sia aperado.

Estis multaj malhelpaĵoj por nia Observatorio eldoni la revuon en Esperanto-lingvo. Ĝis pasinta jaro nia revuo ricevis monan helpon de ŝtataj instancoj, sed — pro necesa ŝparkurso en nia lando dum lasta tempo — nia revuo pasintjare ne ricevis jam plu la helpon kaj la Observatorio devis kovri la konstantan deficiton de »HOMO kaj KOSMO«.

Pro tio, por ne ĉesigi la revuon, nia redakcio sendados ek de nun la revuon nur la tiuj legantoj, kiuj regule pagados la abonon.

La redakcio plej afable petas ĉiujn legantojn (kaj ankaŭ la perantojn), kiuj deziras plue ricevadi nian revuon, ke ili skribu al ni poŝtkarton — ili ne devas tuj sendi abonon — nur skribu la poŝtkarton, por ke la redakcio sciu kun kiom de firmaĵaj abonantoj la revuo povas kalkuli en la estonto.

### Ni funebras

Kun granda malĝojo nia redakcio ricevis informon, ke nia oferema perantino, s-anino **Jadwiga Paszkiewicz**, forpasis en Katowice (Pollando) en profunda maljuneco. Nia revuo perdis fidelan perantinon kaj E-movado bonan, modestan kaj modelan samideaninon.

# KIAMANIERE ABONI

## la revuon »HOMO kaj KOSMO«

La jarabono por la revuo »HOMO kaj KOSMO« estas **1,70 usona dolaro** (aŭ **7,80 francaj fr**, **4,90 germ. markoj**, **35,50 aŭstr. ŝil.**, **1000 ital. liroj**, **5 ned. guldenoj ktp.** — ĉi tie nemenciitajn valutojn, kiuj estas tro multaj por povi ilin ĉiujn presi — ĉiu abonanto elkalkulu mem laŭvole laŭ unu el supraj valoroj). La abonon estas plej simple engagi en via propra (nacia) mono.

La plej praktika maniero estas sendi la abonsumon en la nacia mono per la kutima poŝta engagilo ĉe via loka poŝtejo. En tiu okazo sendu la monon NUR al sekva adreso: Zvezdarnica, 41103 Zagreb, Opatička 22, p. f. 38, Jugoslavio.

Se via loka poŝtejo, eble, ne volas akcepti la monon sendotan al Jugoslavio per simpla monenpagilo, tiam vi sendu monon pere de via loka banko. En tiu okazo sendu la monon simple al la ĉekkonto de nia revuo. La kompleta adreso de nia ĉekkonto estas: Zvezdarnica, Zagreb, 301-620-1001-3096-622 (Kreditna banka Zagreb), Jugoslavio.

**La tria maniero por sendi la abonon** estas — sendi ĝin al la peranto de la revuo »HOMO kaj KOSMO« en via lando (se en via lando jam estas la peranto de nia revuo). La listo de la landaj perantoj troviĝas sur la kovrilpaĝo de ĉi-numero. (Se en via lando ne estas peranto, vi povas aboni la revuon pere de la perantoj en tiuj landoj, kie ili estas).

En Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio povas aboni »HOMO kaj KOSMO« **nur ĉe la landa peranto** de la revuo. La jarabono por »HOMO kaj KOSMO« en la menciitaj landoj estas: Bulgario — 2 levoj, Ĉeĥoslovakio — 30 kronoj, GDR — 3 markoj, Hungario — 30 forintoj, Pollando — 30 zlotoj, Rumanio — 15 leoj, Sovetunio — 1,60 rubloj.

Sendante la abonon al la landa peranto — por ne tro ŝarĝi lin, bonvolulon, per la superflua laboro — ni rekomendas al vi **samtempe skribi poŝtkarton al nia redakcio** (la adreso: Astronomia observatorio, 41103 Zagreb, p. f. 38 Jugoslavio) kun la informo ke vi ĵus sendis la abonon al la landa peranto. Por ne tro laborŝarĝi la peranton vi sendu al li nur abonon, vian precizan adreson kaj la mencion, ke la sendaĵo estas abono por la revuo »Homo kaj Kosmo«. Pri ĉio alia (informoj, demandoj, rimarkoj, klarigoj ktp.) komuniku rekte kun la redakcio.

---

Ĉasopis »HOMO kaj KOSMO« izlazi potporom Republičkog Savjeta za naučni rad SRH. Izdavač: Zvezdarnica, Zagreb, Opatička 22.  
Odgovorni urednik: Marija Divjanović

---

# SENGENAJ DIALOGOJ

de

**Alberto Fernandez**

kunlaboranto de »Homo kaj Kosmo«

estas nova STAFETO-libro en la serio popularsciencia, arte ilustrita de **Jan Verwest**, presita sur senligna artpresa papero. Formato 15 × 22 cm, 200-paĝa, prezo 3,50 us. dol. aŭ egalvaloro.

Al la legantoj de nia revuo la enhavo de la nova libro estas nur parte konata, ĉar ties artikoloj aperis en nia revuo, sed la aŭtoro funde reverkis plurajn dialogojn kaj aldonis novajn. Krome la tuton nun ornamas 12 artaj ilustraĵoj kaj 5 klarigaj bildoj.

Jen la ĉapitroj:

**Mistera Gravito**  
**Gia Moŝto la Tempo**  
**Klasika Determinismo**  
**Krizo en Determinismo**  
**Determinismo kaj Vivo**  
**La Materio fantomiĝas**  
**Stranga Mikrofamilio**  
**Kio vi estas, Materio?**  
**Diktatoro: la Entropio**  
**La Vivo ribelas**  
**Kiel estiĝis la Vivo?**  
**La Evoluo orkestras**  
**Genetika Loterio**  
**Genoj obeemaj sed...**  
**La natura Selektio**  
**Duvizaĝa Evoluo**  
**Ŝtormo en la Biosfero**  
**Kien, Homo?**



Nia redakcio jene prijuĝis la tutan serion:

»La lingvaĵo, la stilo, la humoro estas vere altnivelaj. Sed, kio la »rutinulojn« ĉe la Observatorio pleje impresis, estas la eleganteco de la spirito, kiu la plej profundajn filozofiajn problemojn de la Kosmo kaj de la Vivo prezentis en supereca, leĝera babilmaniero...«

Jugoslaviaj legantoj povas havigi la libron ĉe Marinko Gji-voje, P. p. 5025, 41040 ZAGREBAČKA DUBRAVA, Jugoslavio kontraŭ rabatita prezo de 52.— din. inkluzive ekspedkostojn por registrita ekspedo.

## PERANTOJ

### de la popularscienca revuo »Homo kaj Kosmo«

- Aŭstralio kaj Oceanio:** S-ino Irene Fink. MOUNT WAVERLEY, P. O.  
Box 32, Victoria, Australia
- Aŭstrio:** S-ano Hugo Kraus, Brigittenauer Lände 150/5/3/12 WIEN XX
- Belgio:** S-ano Alberto Fernandez, Galglaan 20, GENT, pŝtĉk. 1010.24
- Britio:** Brita Esp. Asocio, 140 Holland Park Av. LONDON W. 11.
- Bulgario:** K-do Metodi Panĉev, str. Persenk, Blok 16, SOFIA — 7
- Ĉeĥoslovakio:** K-do Libor Křivanek, Zborovska 1332. PISEK
- Danio:** S-ano Egon Starup, Vingetoften 34. 2730 HERLEV
- Finnlando:** Fondumo-säätiö ESPERANTO, SF-02220 IIRISLAHTI.  
Esperantotie 4
- Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34, Rue Chabrol PARIS 10
- Germanio:** S-ino Nora Caragea, 6 Frankfurt a/M 55 poŝtŝtako 550153
- Hispanio:** Hispana Esperanto - Instituto, BARCELONA, Apart. 2428
- Hungario:** K-do Abonyi Árpád, VÁRPALOTA, p. f. 27
- Italio:** Itala Esperanto - Federacio, TORINO, Via Po 7
- Japanio:** Rondo Konkorda (ĉe s-ano Komai) 12 Šogoin-nakamaĉi,  
Sakjo-ku KIOTO 606
- Nederlando:** S-ano Ru Bossong, Floraplein 23, EINDHOVEN
- Norvegio:** Odd Kolbrek, Kaldbakkstuppen 22, OSLO 9
- Polujo:** S-anino Ewa Walaszek, SOSNOWIEC, ul. Jagielowska 1/47
- Rumanio:** S-ano Draghici Viktor, St. M. Basarab 27, BRASOV
- Sovetunio:** K-do Johanes Palu, Sölme 21, TALLINN 16, Estonio
- K-do Ivan Palkin, ul. Svernika 7, korp. 3, kv. 44, MOSKVA M-449
- K-dino A. P. Hohlova, abon. jaŝĉ. 325, 252024 KIEV-24
- K-do R. Zakaŝankis, Abon. deĵe 10, VILNUS-C, Litovio

La interlokaj perantoj, ricevintaj plurajn ekzemplerojn de ĉi tiu numero, estas petataj dissendi ilin al la samaj adresoj, al kiuj ili sendis la pasintan numeron.

## HOMO kaj KOSMO

estas la unua populara naturscienca revuo regule aperanta en Esperanto kaj oficiale eldonata de la Astronomia observatorio.

Se la revuo »HOMO kaj KOSMO« plaĉas al vi, vi informu pri ĝia apero kaj pri la aboneblo viajn esperantistajn amikojn.

La revuo »HOMO kaj KOSMO« estas aparte konvena legaĵo por:

ĉiuj lernejoj kie estas instruata Esperanto  
ĉiuj Esperanto - kursoj, societoj kaj seminarioj  
ĉiuj junularaj grupoj

»HOMO kaj KOSMO« estas abonebla en ĉiuj landoj.

La revuo »HOMO kaj KOSMO« estas rekomendita de la organo de U. E. A. (»Konsulta Komisiono pri Lernejoj«) kiel tre taŭga legaĵo en la lernejoj, kie estas instruata Esperanto.

N-ro 1/1973.